

Leterkesto, diversajoj, 1.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1990 novembro 08.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo90-23/SRI-1990-23-B-6-Claude-kaj-Andree-Gacond-Leterkesto-diversajhoj.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Ni daŭrigas nian konversacion kun la geaŭdantoj, kiuj skribis. Kaj ni multe dankas al ĉiuj, kies mesaĝoj aŭ raportoj plenigas nian leterujon.

Karel KOPECKY en Trebechovice, Ĉeĥoslovakio sendis 2 mesaĝojn:

A.- Aŭskultinte viajn respondojn al ricevitaĵoj leteroj mi denove konsciis kiel grandan ŝuldon mi havas ĉe vi. Pardonu al mi, ke mi ne estas skribema, kvankam mi aŭskultas vin ĉiu-semajne ne nur trifoje. sed ankaŭ 2-foje ripetadon, kiam vi elsendas por ekstereŭropo. Ĝi estas ankaŭ bone kaptebla. Nur mi bedaŭras, ke sabata elsendado ne estas ripetata... Via elsendotempo por Eŭropo vere ne estas konvena. Plej multe da homoj laboras tiutempe kaj ankoraŭ junaj homoj estas en lernejo. Pro tio mi viajn elsendojn devas surbendigi kaj la kasedojn mi pruntedonas al miaj kursanoj. Kial? Viaj elsendoj estas enhave riĉaj, valoraj kaj prononcmaniere perfektaj kaj tio estas ĉefa kialo, kial mi kasedojn uzas ankaŭ kiel montraĵojn kaj siamaniere kiel varbilojn. Kursanoj kaj klubanoj en Hrades Kralove unuanime esprimas la samon: "Domaĝe, ke mi ĝin ne povas aŭskulti rekte el radioaparato..." Ke via esperanta elsendado daŭras nur 11-13 minutojn. Vi ŝparas tempon kiel kun safrano! Kial oni ne povus plilongigi viajn elsendojn anstataŭ muziko. - Mi nur aldonas: mi ŝatas muzikon, sed preferas interesaĵojn el via lando. Pri tio ni multe diskutas en nia klubo. Nuntempe ni rigardas al certaj ŝtatoj kiel Aŭstrio, Svislando, Svedio ... por transpreni iliajn spertecojn por nia vivo, ĉar ĉe ni ĉio ŝanĝiĝas post la revolucio de tago al tago. Ni devas lerni de la sperto de aliaj, ĉar ni perdis 40 jarojn.

Cl.- Rudolf KOPPEL en Karlsruhe, Germanio, skribis:

A.- Ĉijare, je la 3-a de julio 1990 ekestis ĉe la firmao Siemens AG en Karlsruhe, nova Esperanto-grupo, kiu nomiĝas "Esperanto-klubo Siemens Karlsruo. La laborcelo de tiu grupo estas utiligi Esperanton sur la kampo de tekniko, kiel racia komunikad-maniero de ĉiuj teknikistoj. Ni, anoj de Esperanto-klubo Siemens Karlsruo salutas ĉiujn teknikistojn de la mondo, informante, ke ni volus konekti kontaktojn kun aliaj teknikaj Esperanto-grupoj kaj Esperanto-teknikistoj tutmonde. Se vi, en via firmao ankoraŭ ne posedas Esperanto-klubon sed volus fondi tian, tiam ni servos vin per informoj pri nia strukturo, statuto kaj labormaniero.

Cl.- Albrecht KRONENBERGER en Neustadt, Germanio tre interesiĝis pri intervjuo kun Istvan ERTL pri romano de Ulrich MATTHIAS. Li konas la verkiston. Ni citas:

A.- Estas inteligenta, afabla, ĝentila juna viro, laboremulo por Esperanto, kiu regule partoprenas la kunvenojn de la Kurpfalz-Ligo en Mannheim. Ĉu vi povus sendi al mi la manuskripton de tiu parto (pri la verko de Ulrich Matthias) de via elsendaĵo?

Cl.- Por ni tio estas maifacila afero, ĉar la intervjuojn ni ne antaŭredaktas. Sed ni nin organizos, por povi kopii kasedojn. Tiu servo disvolviĝos ne kadre de Svisa Radio Internacia, sed de la aktiveco de la Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia en la Biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds. Al tiuj, kiuj havigos al ni kasedon kaj 3 respondkuponon por la resendokostoj, ni kopios la petitajn elsendojn. Ili atentigu nin kun precizo pri la dezirindaj kopioj kaj ni provos ilin kontentigi.

A.- Saluton al Anton KRONSHAGE en Schweim, Germanio,

Cl.- al Harri LAINE en Espoo, Finnlando, kiu skribis:

A.- Mi aŭskultis vian programon (leterkesto sabaton 27-an de januaro 1990, ondo 21,770 Megahercoj, tre bona aŭdebleco) legatan de Claude GACOND kaj de alia viro (ĉu s-ro KÜNZLI? mi ne bone kaptis la nomon).

Cl.- Jes, kun mi parolis Andy KÜNZLI. Harri LAINE daŭrigas:

A.- Skribis al vi multaj personoj el Ĉeĥoslovakio kaj Francio, kaj eĉ unu el mia lando. Vi diris, ke malofte atingas vin leteroj el Finnlando. Eble tion klarigas la legende malbonfama neskribemo de finnoj. On plendas, ke finnoj kutimas ne respondi leterojn, des malpli verŝajne mi meminiciate ekskribas.

Cl.- Saluton al Georges LARGLANTIER en Paris, Francio.

A.- Ni ricevis 5 mesaĝojn de Jiri LAUBE en ROUDNICE en Ĉeĥoslovakio. Li skribis:

Cl.- Post longa tempo mi denove donas vivsignon pri mi. Mi aŭskultas vin ofte, sed vere mi ne havas fortojn por multe skribi. La programoj estas vere bonaj. La lingvaĵo estas elstara, ankaŭ tiu de István ERTL, ĵaude la 19-an kaj sabate je la 9-a horo 45 laŭ la somera tempo sur 31 metroj. Nur unu rimarko: Karolo PIČ naskiĝis la 6-an de decembro 1920, sekve li fariĝos 70-jara en decembro.

A.- El la letero de Jiri LAUBE ni ricevas eĥojn pri la okazantaĵoj en orienteŭropo:

Cl.- Nia lando travivas historian periodon kaj mi sentas min devigata partopreni en la politika evoluo, kvankam mi estas jam 67-jara. Mi estis en karcero en la kvindekaj jaroj, kaj ankaŭ post la jaro 1968 mi havis malfacilaĵojn, sekve mi sentas min pravigita engaĝiĝi... Mi supozas, ke Eŭropo unuiĝos, jam nun kreiĝas konfederacioj kun diverslingvaj nacioj.

A.- Josef LECHERMEIER en Ingolstadt-Irgertsheim, Germanio eldonas tre utilan informilon pri la stacioj, kiuj emisias en esperanto. Ni volonte transdonos lan adreson al interesatoj.

Cl.- Saluton al A. LEGRET en Vire, Calvados, Francio.

A.- Al Rosario LICITRA en Ragusa, Italio.

Cl.- Cornelius J. McKOWN en State College, Usono, aŭdis la mencion de sia nomo en la pasinta leterkesto.

Cl.- Saluton al Vittorio MADELLA en Parma, Italio.

A.- Rokuro MAKABE en Frankfurt am Main, Germanio okcidenta, sendis 2 mesaĝojn. Li bedaŭras, ke nur sabate li povas aŭskulti niajn elsendojn pro la fuŝloko tempa de la aliaj elsendoj.

Cl.- Andrew MARSZALKOWSKI en Gdansk, Pollando, sendis 2 detalajn kaj utilajn aŭdraportojn, kiuj montras, ke li estas tre regula aŭskultanto, Ankaŭ en la franca, itala, angla lingvoj li aŭskultas Svisan Radion Internacian.

Cl.- Jens MERKER en Cottbus, Germanio skribis:

Kun intereso mi preskaŭ ĉiusemajne sekvas viajn programojn el Bern. Kvankam via elsendo "nur" daŭras dek minutojn, ĝi do ĉiam entenas multe da interesaĵoj kaj mi volonte aŭskultas ĝin.

A.- De NAGANAUA Hidetoŝi en Gifu, Japanio, ni ricevis aŭdraporton pri elsendo de la 16-a de majo.

Cl.- István NAGY en Budapeŝto, Hungario, skribis:

A.- Mi ĵus surgluis la poŝtmarkojn kaj volis peti la novan programkajeron, kiam ĝi alvenis. Dankon... Ne esperu pri la ofta skribado, ĉar la heredajon de la soveta komunismo, kvardek jarojn, ne eblas malaperigi, prezoj altiĝas, pensioj nur iome. Ankaŭ la poŝtaj tarifoj !

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. La venontan semajnon Claude kaj Andrée GACOND daŭrigos sian salutadon al la skribintoj. Ĝis reaŭdo !